

ĜENERALA KONGRESRAPORTO DE LA 10A MEKSIKA ESPERANTO-KONGRESO¹, OKAZINTA INTER LA 18A KAJ 21A DE JUNIO EN LA JURA FAKULTATO DE LA UNIVERSITATO NACIA AŬTONOMA DE MEKSIKO (UNAM)²

Jaŭdo la 18a de junio

La unua kongresa tago komencis per la disdono de flugfolioj pri la evento en kelkaj lokoj kaj fakultatoj de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko: Kati Brownshire, Guadalupe Vega, José Martín Cruz, Daniel Moreno kaj Javier Vásquez, partoprenintoj de la kurso kaj seminario volonte akceptis ĉi tiun taskon. Iom post iom la kongresanoj alvenis al la kongresejo kaj komencis ĝui la vesperon salutante al malnovaj kaj novaj geamikoj. La akceptado kaj registriĝo de la partoprenintoj rapide okazis danke al la frua partoprenkonfirmo de ili en la kongreso. Kelkajn minutojn post la 4a vespere la unua preleganto, Luis Kordova Arellano (Prelego 1), malfermis la eventon per sia prelego nomita: “La rezolucioj de UNESKO pri Esperanto kaj UNAM”. Li donis tre interesan kaj gravan informon ne nur pri la historio kaj rilato de Esperanto kaj UNESKO, sed ankaŭ pri la graveco en la meksika movado, kiun havas UNAM kaj la aktuala instruado de la Internacia Lingvo en la Jura Fakultato. La prelego daŭris iom pli ol la planita tempo poste kelkaj partoprenantoj, ekslernantoj de la pasintaj kursoj en la jura fakultato, parolis pri sia sperto uzante esperanton.



Grupa foto de partoprenintoj de la 10a Meksika Esperanto Kongreso.

Minutojn antaŭ la 6a vespere, la kongresanoj alvenis al la Restoracio Fernando's, ĝue, agrable kaj parole vespermanĝis. La aktivecoj de la unua kongrestago finiĝis proksimume je la 8a kaj duono vespere, ĉiuj devis reveni baldaŭ al la domo por komenci frue la venontan tagon.

¹ Entute partoprenis 58 personoj el Germanio, Hispanio, Kubo, Meksiko kaj Usono en diversaj tagoj kaj kongresaktivecoj. De Meksiko venis al la kongreso personoj el la sekvaj urboj: Ecatepec, Guadalajara, Meksikurbo, Nezahualcōyotl, Querétaro, Tecámac, Texcoco, Tijuana, Toluca, Tulancingo, San Luis Potosí kaj Zacatecas.

² Tiu ĉi dokumento estis verkita de la sekvaj estraranoj de MEF; Daniel Moreno Martínez, ĝenerala sekretario, Morayma Martínez Mateos, kasistino, David López Rueda, membro. Ankaŭ ni prenis informojn de kelkaj prelegantoj, kiuj donis al ni resumon de sia prelego. La fina raporto estis kontrolita de Mallely Martínez Mateos, prezidantino de Meksika Esperanto Federacio.

Vendrede je la 19a de junio

La 10a Meksika Kongreso de Esperanto estis oficiale malfermita en la Aŭdejo de la Posgradejo de la Jura Fakultato je la 9a horo matene.

La ĉefo de la Departamento pri Postgradaj Juraj Studoj, D-ro Leonel Armenta López kune kun Mallely Martínez Mateos, prezidantino de MEF; Maritza Gutiérrez González, kunordiganto de la Amerika Komisiono; Luis Córdova Arellano, kunlaboranto de la kongreso; kaj Daniel Moreno Martínez, ĝenerala sekretario de MEF inaŭguris la 10an MEK-on.



Malfermo de la 10a Meksika Esperanto Kongreso. De dekstre al maldekstre Luis Córdova, Maritza Gutiérrez, Leonel Armenta, Mallely Martínez, Daniel Moreno.

Komencis en diversaj salonoj la prelegoj, ĉiuj en la internacia lingvo esperanto, krom unu kiu estis en indiĝena lingvo Mixe:

Prelego 3. Martín Rodríguez Arellano: “La indiĝena literaturo en la 21^a jarcento”

Li parolis pri la graveco publikigi verkojn indiĝenajn por kuraĝigi la verkantojn labori pli en sia lingvo. Indas mencii ke li prelegis en indiĝena lingvo, nomata “Mixe” kaj montris la prezenton hispane.

Prelego 4. David López Rueda: “Indiĝenaj lingvoj en San Luis Potosí”

La ĉeestantaro povis aŭskulti, inter aliaj gravaj informoj, kiuj geografiaj regionoj ekzistas en la ŝtato; Altebenaĵo, Ŭasteka, Centra kaj Meza; kies indiĝenaj lingvoj estas la plej parolataj en San Luis Potosí; la naŭatlan (náhuatl), ŭastekan (huasteca), pame-an (pame), mazaŭan (mazahua).

Prelego 5. Raúl Anguiano Gnädinger: “La naŭatla: lingvo de niaj radikoj”

Kie li parolis pri la antikva lingvo de meksikanoj. Li prelegis unue en esperanto, poste en la hispana kaj fine en la lingvo náhuatl. Fine krom klarigi la signifon de kelkaj vortoj, li parolis pri la antikvaj kutimoj meksikaj.

Prelego 6. Maritza Gutiérrez González: “Lingvistika diverseco kaj lingva ekologio en Latinameriko: defio por daŭripova evoluo”

Unu el la plej interesaj donitaj informoj estis ke oni apenaŭ havas proksimuman nombron da lingvoj ankoraŭ parolataj en Ameriko kaj la plimulto de amer-indianaj lingvoj estas forte markitaj de la stigmo de longa koloniado, pro tio trovas sin reduktitaj al la kategorio de minoritataj lingvoj, kondamnitaj je socia periferio de ties parolantoj diskriminacitaj, aŭ en plej bonaj okazoj, transformitaj en ekzotikaĵojn, lontanajn eĥojn de pasinteco konkerita kaj venkita.

La koncepto de daŭripova evoluo prezentas evoluon kiel harmonian procezon, kie ekspluatado de la rimedoj, la mastrumado de investoj, orientiĝo de teknologiaj transformoj kaj instituciaj ŝanĝiĝoj devas kongrui kun la bezonoj de la generacioj nuntempaj kaj estontaj. Tiamaniere, evoluo prezentiĝas kiel procezo postulanta tutgloban progreson jen en la soci-ekonomika branĉo jen en la media kaj homa branĉoj. Spite al la rapida akcepto kaj disvastiĝo kiel koncentrita esprimo de evolustilo pli homa kaj egaleca, la originala versio de tiu ĉi tezo havas limigojn, precipe en la kazoj de landoj, kiel la latinoamerikaj, kiuj havas tre specifajn kaj gravajn soci-ekonomikajn defiojn.

Prelego 7. Martin Schäffer: “La lingvistika situacio 150 jaroj post la naskiĝo de Zamenhof”

En lia prezentado, Schäffer atentigis ke en la historio de la homaro la malapero de lingvoj ĉiam okazis, sed ke la kvanto de lingvoj kiuj malaperis aŭ kiuj baldaŭ povas malaperi en la lastaj 150 jaroj post la naskiĝo de Zamenhof katastrofe plialtiĝis. Estas taksoj ke ĝis la fino de la jarcento malaperos 50 % de la ekzistantaj lingvoj. Kelkaj eĉ parolas pri 90 % de la lingvoj. Per ĉiu morto de lingvo malaperas peco de la homara kulturo. En Meksiko ankaŭ estas multaj mortantaj lingvoj kaj ni devas fari ĉion por halti la formorton de meksikaj lingvoj ne nur parolante, sed ankaŭ investante monon. Nur tiel ni povas eviti ke formortos parto de nia kulturo.

Prelego 8. Javier Vásquez Ochoa: “Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj kaj nia Esperantlingva komunikkapablo”

Inter la plej interesaj informoj, kiujn la ĉeestantoj aŭskultis en tiu ĉi prelego estas ke: Laŭ la Bulonja deklaro, Esperantisto estas persono, kiu scias kaj uzas Esperanton. Kelkaj aŭtoroj diras, ke scii kiel paroli lingvon signifas havi aŭtomatajn rutinojn. La Komuna Eŭropa Referenckadro estas gvidilo uzata por priskribi atingojn de lernantoj de fremdlingvoj kaj ĝi povas helpi nin pripensi nian Esperanton. Ĝi entenas interesajn ilojn por pritaksi nian Esperantlingvan komunikkapablon.

Prelego 9. Fidel Figueroa Martínez: “Spertoj dum mia esperantista vivo”

Inĝ. Figueroa brile prezentis sian Esperanto-historion. Li kiel veterana Esperantisto kaj bona konanto de la historio de Esperanto raportis pri diversaj interesaj punktoj de tiu historio. Fine li faris alvokon fariĝi membro de Esperanto-organizaĵo kaj de UEA, subtenante tiel la ideon de Esperanto kaj ĝian disvastiĝon.

Prelego 10. Bernandino Milton Hernández García: “La indiĝenaj lingvoj de Meksiko kaj ĝiaj devenaj lokoj”

Kie ni povis aŭskulti kiujn lingvojn oni parolas en diversaj Ŝtatoj de la Lando.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

Tuj post la malfermo kaj dum la tuta tago estis libroservo, en kiu estis ofertataj libroj, romanoj, kursoj, vortaroj, afiŝoj, kaj tiel plu. Inter la prelegoj la ĉeestantoj profitis kaj vizitis la libroservon por aĉeti necesan materialon.

Prelegantoj dum la 10a Meksika Esperanto Kongreso



Fidel Figueroa Martínez



David López Rueda



Maritza Gutiérrez González



Martin Schäffer




Milton Hernández García



Javier Vásquez Ochoa



Martín Rodríguez Arellano



Maldekstre. Raúl Anguiano Gnädinger



Dekstre: Luis Córdova Arellano

Fine de la programo okazis Arta Vespero, kie Morayma Martínez kaj Gabriel Jiménez prezentis belegan spektaklon kantan, en la zapoteka kaj la hispana. Poste lernantinoj de la kurso de esperanto en UNAM; Betsabé Rubio, Ma. del Carmen Rojas kaj per la apogo de Selene González prezentis teatraĵon "Klauno". Fine Morayma kaj Gabriel prezentis "La Spektaklo de la Pupteatro", kie ili kantis en Esperanto kaj dancis, helpataj de Daniel Moreno, kiel rakontisto.



Morayma Martínez kaj Gabriel Jiménez kante dum la arta vespero.



De dekstre. Betsabé Rubio, Carmen Rojas kaj Selene González ludante teatraĵon.

Sabate, je la 20a de junio

Okazis la ĝenerala asembleo de la Meksika Esperanto Federacio. Je la 9a matene oni kunvokis la



Estraranoj de MEF. De dekstre. David López, Morayma Martínez, Mallely Martínez kaj Daniel Moreno.

MEF-membraron kaj la asembleo komencis iom post la 10a. Dum la asembleo estis pritraktataj diversaj temoj kiel la jara raporto, kaj la sendependa grava laborado de aliaj samideanoj. Estis proponataj novaj kotizoj por la venontaj jaroj.

Post la asembleo kaj post ŝanĝo de aŭdejo, okazis prelego (11) kaj invito de Maritza Gutiérrez al la 95a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Havano, Kubo. Ŝi afable preparolis kelkajn temojn kaj konsilojn pri la vivo, turismo kaj kulturo en Kubo.

Poste Sinhué Flores plezurigis la ĉeestantaron per sia fluto, kiun li afable, arte kaj majstre ludis antaŭ la aŭskultantoj.



Sinhué Flores ludante la fluton.

Fine, je la 14a horo kaj 20 minutoj la kongresanoj solenis la fermon de la 10a Meksika Kongreso de Esperanto, kies temo estis Lingvistika Diverseco en Meksiko: Fundamenta Parto de Ĝia Kulturo; kaj kies finaj konkludoj estas:

Ke la meksika nacio enhavas diversajn vivantajn lingvojn indiĝenajn.

- Ke tiuj lingvoj riĉigas la meksikan kulturon kaj donas al meksikanoj propran kaj unikan personecon mondnivele.
- Ke la plej granda parto de tiuj lingvoj, kaj aliaj en la mondo, nuntempe estas endanĝerigitaj je malapero pro manko de informo kaj atentigo pri ilia graveco.
- Ke ili estas protektindaj ĉar en ili troviĝas grava kaj granda parto de la meksika agmaniero kaj pensmaniero.
- Ke la meksikanoj mem devas zorgi pri ili per verkado, publikigado, instruado kaj informado de tiuj lingvoj.
- Ke ĉiu meksikano devas fieri pri sia heredaĵo kaj kultura kaj lingva.
- Ke la kongreso estis vere sukcesa ĉar ĝi klare montris la gravecon kaj indecon de la meksikaj indiĝenaj lingvoj; kaj rimarkigis la urĝan bezonon por ilia zorgo.

Pli malfrue la kongresanoj kuniĝis denove en restoracio "Los Tres Poblanos" tre proksime de universitato por ĝui agrablan etoson manĝante kune.



De dekstre. Luis Córdova, Maritza González, Mallely Martínez kaj Daniel Moreno dum la fermo de la 10a Meksika Esperanto Kongreso



Sanon pro tiu motivo! Vespermanĝo en restoracio "Los tres poblanos" post la fermo de la kongreso.

Dum tiu tagmanĝo Martin Schäffer parolis pri la neceso havi junularan organizon ene de MEF kaj la ĉeestantaj junuloj decidis ĝin fari kaj elektis tri reprezentantojn kaj diskutis la ĉefajn regulojn por tiu organizo. La elektitaj reprezentantoj estas: Gabriel Jiménez, el Tulancingo, Betsabé Rubio, el Meksikurbo kaj Katherine Brownshire, el Guadalajara.



Junulaj kongresanoj, kiuj partoprenis la fondon de la nova Meksika Esperanto-Junularo

Dimanĉo, la 21an de junio

Laŭ la kongresa programo, la esperantistoj kuniĝis en la busstacio Taxqueña proksimume je la 9a horo matene por iri al nia veturcelo: la vilaĝo de Tepotztlán. Dum la grupanoj atendis ke la grupo pleniĝas oni profitis por babili kaj plikonatiĝi. Aĉetinte la biletojn, ni ĉiuj marŝis al la haltejo de aŭtobusoj por eniri la veturilon je la 9a kaj 30. Tie Martin Schäffer profitis kelkajn minutojn por deziri bonan vojaĝon al la partoprenantoj kaj por informi al ili pri la veturdaŭro (1h30 proksimume), ĉio en Esperanto.



Kongresanoj, kiuj partoprenis la ekskurson en Tepotztlán, Morelos.

Alveninte al la loka haltejo de aŭtobusoj ni devis preni aŭton kiu nin kondukis al la centro de la vilaĝo, de kie ĉiuj kune promenis sur unu el la ĉefaj stratoj ĝis kiam ni atingis vendejon kie ni gustumis glaciaĵojn bongustajn kaj neimagineblajn. Kiam ni alvenis al la kiosko, parto de la partoprenantoj decidis skaladi la faman kaj mirindegan monteton Tepozteco, samtempe la alia parto decidis promeni kaj ĝui la vilaĝon pentrindan kun ĝiaj manĝo-vendejoj, vestaĵbutikoj, ktp.

Ĉirkaŭ la 10a horo matene la skalado al la monto komenciĝis. Do ni dividiĝis je malgrandaj grupoj por havi organizatan supreniradon, kiu estas bezonata en ĉi tiaj ekskursoj. La unua grupo estis formita de Katy Brownshire, Horacio Parker, Sinhué, Betsabé, Alejandro Mejía, Daniel Moreno kaj David López.

La vojo farita per vulkanaj ŝtonoj, plejparte glataj kaj glitigaj, kaj ĉirkaŭita de belega vegetaĵaro estis malfacila kaj laciga. Tamen, la kunirado kaj ĝojo inter la esperantistoj faciligis ke la emo ne defalu kaj tiel ni povis atingi nian finan celon, la pinto de la Tepozteco, kie piramido staras.

Tie ni povis foti la belegan vidaĵon de la vilaĝo Tepoztlán kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ripozi kaj trinki akvon. Eĉ Sinhué volis plezurigi nin ludante kelkajn melodiojn per sia fluto. Tion ŝatis ne nur tiuj kiuj akompanis lin sed la aliaj ekskursantoj sur la monteto.

Ŝajnis ke la ĉielo avertis al ni pri la pluvo, sed ne estis ĝis tiam kiam la dua grupo de esperantistoj (Gabriel Jiménez, Morayma Martínez, Mallely Martínez, Martin Schäffer kaj José Martín Cruz) atingis la pinton komencis pluvegi. Kvankam ĉi tio ne malebligis la fotadon de la samideanoj kune kun la esperanta flago, kaj tiel montri ke la esperantistoj jam skaladis la Tepozteco-n.



Sekve de la pluvo ni devis resti sur la monteto dum proksimume dek kvin minutoj ĉar la malsupreniro tra la ŝtupoj ŝtonaj estis riska kaj danĝera tiel pluvante. Tial la malsuprenirado estis malpli laciga sed eble same malfacila. Dum ĉi tia veturado kelkaj el la grupanoj povis babili kun aliaj ekskursantoj kiuj estis allogitaj de la kurioza lingvo kiun la esperantistoj marŝantaj parolis.

Ekskursanoj sub la pluvo, ĉe la monteto "Tepozteco" en Tepoztlán, Morelos.

Je la tria horo posttagmeze ni, la lastaj grupanoj revenis al la centro de la vilaĝo kaj, ĉar la tempo kuris kaj ni devis atingi la lokan haltejon por esti poste realportitajn al la stacio Taxqueña, ni devis rapide promeni kaj serĉi lokon por tagmanĝi antaŭ foriri. Do, kvankam nedaŭra la promenado en ĉi tiu vilaĝo ofertis al mi ŝancon flari, vidi kaj aŭdi diversajn odorojn, kolorojn kaj sonojn, de la kopalo, maizo, malseka grundo ĝis la ruĝkoloraj kaj flavkoloraj vestaĵoj en la barataj vendejoj kaj la latina muziko el la diversaj butikoj.

Je la kvina horo kaj dudek minutoj ni ĉiuj eniris la aŭtobuson, kiu kondukis nin al la stacidomo en Meksikurbo, kie oficiale la ekskurso devis finiĝi. Ĉi tie multaj el ni komencis adiaŭi la aliajn kaj deziri bonan fortunon, sanon kaj vojaĝon ĉar la plejmulto devis ekiri al sia hejmo en Meksikurbo, Meksikŝtato kaj eĉ ekstere de la lando.

Ni certas ke ni ĉiuj ĝuis kaj feliĉis pro la kunvivo kaj la agrablaj momentoj vivitaj kune kun tiom malsamaj homoj sed unuiĝitaj per la sama lingvo kaj la filozofio pri frateco kaj toleremo, kiun ĉi tiu lingvo protektas. Pro ĉi tio, karaj geamikoj, multajn dankojn kaj ĝis la venonta!